Dokumente-Informationen
Kajero 3/74

PILO-PRESS
Internacia
Informservo

"Das Problem der Kommunikation in der Welt" de Dr.G. F. Makkink
DIN A 5, 20 p.
Prezo 2,50 DM

Eldonanto/Herausgeber:
Ludwig Pickel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg 1
Tel. (0911) 46 36 49; 51 42 69

N-ro 37/1974 - 22 okt 1974
Aperas ĉiusemajne

## Ĉu Paderborn fariĝos Esperanto-urbo?

Paderborn (pp) De la 18 ĝis 20 oktobro 1974 okazis en Paderborn diversspecaj aranĝoj en aŭ pri Esperanto, kiuj vere pravigas la demandon, ĉu tiu historia urbo kun 75 000 enloĝantoj, situanta en la orienta parto de Vestfalio, fariĝos vera Esperanto-urbo.

La nomo de la urbo ja fakte jam furoras tra la Esperanto-mondo dum jam pli ol unu jaro kunlige kun la agadoj kaj ideoj de prof. d-ro Helmar Frank kaj Hermann Behrmann. Pilo-Press do utiligis la okazon kaj ĉeestis mem la semajnfinajn aranĝojn de la 18 - 20 okt.

### Kunveno de gepatroj

Vendrede, 18 okt, vespere, okazis kunveno de gepatroj, kies infanoj lernu Esperanton ekde la venonta printempo, kadre de la internacia eksperimenta Esperanto-instruado en okcidentaj landoj. La gepatroj ( ĉ. 30 - 40) sekvis kun intereso la eldirojn de prof. d-ro Frank kaj Hermann Behrmann kaj partoprenis vigle en la diskutado. Kun intereso ili ankaŭ rigardis la malgrandan informstandon de Libro-servo Ludwig Pickel, Nürnberg, kaj multaj aĉetis E-lernolibrojn kaj vortarojn por mem lerni Esperanton. Ili intencas kune kun la infanoj lerni Esperanton.

### Nunaj Esperanto-kursoj en Paderborn

La Esperanto-buso de August Weide, Hamburg, jamfariĝas kutima bildo en la urbo kaj vekis grandan interesiĝon. S-ro Weide instruas Esperanton en la popolaltlernejo. Li fakte estas okupita dum ĉiu tago.

Formiĝis Esperanto-kursoj en jenaj lernejoj:

Hauptschule Elsen kun ĉ. 160 lernantoj; Hauptschule Egge en Altenbeken kun ĉ. 20 lernantoj; Bonifatius-Hauptschule Paderborn kun ĉ. 20 lernantoj; Gimnazio Theodorianum Paderborn kun ĉ. 20 lernantoj; Westfalen-Kolleg Paderborn kun 11 lernantoj.

En la universitato de Paderborn ekde la vintra semestro okazas kurso kaj seminario pri mondlingvaj problemoj kaj Esperanto.

### Publika podia diskutado

Vendrede, je la 20a horo, en la aŭlo de la gimnazio Theodorianum, diskutis politikistoj kaj sciencistoj pri la temo "Germana lingvo-politiko por Eŭropo". Ĉeestis reprezentantoj de la du partioj CDU kaj FDP. La Socialdemokrata Partio (SPD) ĝis nun ne multe interesiĝis pri tiu temo. La diskutadon gvidis D-ro Aŝvinikumar, Hindio, kiu nuntempe laboras en la Instituto por Kibernetiko en Paderborn. Pri tiu podia diskutado ni raportos pli detale en unu el la venontaj numeroj de PP.

### Vizito al la Instituto por Kibernetika Pedagogiko

Sabate la partoprenantoj havis okazon konatiĝi kun la laboro kaj la ejoj de la Instituto por Kibernetika Pedagogiko, kies direktoro estas prof. d-ro Helmar Frank. La prototipo de nova klerigilo (instrumaŝino) kaj mallonga demonstracio de Esperanto-leciono vekis grandan intereson.

## Malfermo de Esperanto-restoracio

Nun ankaŭ en Federacia Respubliko Germanio estas restoracio, kiu ofertas siajn trinkaĵojn kaj manĝaĵojn en Esperanto. La menukarto estas dulingva: Germana + Esperanta. En mallonga ceremonio la restoraciestro bonvenigis la Esperanto-gastojn. "Estu kore bonvena ĉe ni en la 'Bareleto'", tie oni povas legi sur la menukarto.

Cetere, "Bareleto" estas la Esperanto-nomo de la restoracio, germane Tönnchen. Jen la adreso de la restoracio: Tönnchen (Bareleto), 479 Paderborn, Kasseler Str. 1

## Fondo de Scienca Konsilantaro

Dum la vesperaj horoj estis fondita "Scienca Konsilantaro", kies tasko estas kontroli la rezultojn de la Internacia Eksperimenta Esperanto-Instruado, kiu komenciĝos venontan printempon en okcidentaj landoj. Al la Konsilantaro apartenas lingvistoj kaj sciencistoj el kelkaj landoj.

## 3a Laborkonferenco de ILUS

La semajnfina konferenco estas aranĝita de la laborgrupo "Interlingvistiko kaj Lingvokibernetiko" (ILUS) de la Internacia Asocio pri Programita Instruado kaj de la germana sekcio de la Eŭropa Edukista Asocio. La prelegoj kaj diskutoj okazis en la universitato de Paderborn.

Prof. D-ro Gyula Décsy, Hamburgo, aŭtoro de la libro "Die linguistische Struktur Europas", en kiu li ankaŭ traktas Esperanton (prezo 48,- DM), prelegis pri "Ikono, diagramo, simbolo - pensoj pri komunikado sen sonsekvencoj".

"Komparo de diversaj planlingvoj" estis la temo de prelegoj de Guido Dignas, Paderborn, kaj Hermann Behrmann.

Ne eblas, mencii aŭ trakti ĉiujn diskutojn en la kadro de tiu laborkonferenco, kies laborlingvo estis la germana kaj Esperanto.

*****************

## Kio estas ROBBIMAT II - Kybernet ?

ROBBIMAT II - Kybernet estas la rezulto de dekjara medididakta konstrukciado dum konstanta instruada elprovo. Ĝi estas klerigilo por individua kaj kolektiva instruado evoluigita de la Instituto por Kibernetiko sub gvido de prof. d-ro Helmar Frank.

Se vi volas ekscii detalojn, petu trilingvan prospekton (germana, franca kaj Esperanta) de E!U.R.O. Lehrtechnik, D-479 Paderborn, Riemekestr. 62 aŭ de E.U.R.O. Lehrtechnik c/o Navarin SA, F-75009 Paris, 4, rue Fromentin, aŭ F-94100 St. Maur des Fossés, 44 rue Garibaldi. Skribu en Esperanto!

*****************

## ROMOLO-kunveno en Frankfurt/M

Frankfurt/M (pp). Dimanĉon, la 17an de novembro 1974, 10 horo, okazos en Frankfurt/M, Eschersheimer Landstrasse 248, Haus Dornbusch, Klubejo 2, la ĉefkunveno de Rhein-Main-Ligo Esperantista. Gastoj estas bonvenaj. Libroservo Pickel, Nürnberg, prezentos librostandon!
Informojn donas: Bernhard Zenker, 645 Hanau, Ramsaystr. 15, Tel. 06181-259834

Kultura semajnfino en Saarbrücken

Saarbrücken (pp) Laŭprograme pasis la 4a Kultura Semajnfino je la 19 kaj 20 oktobro 1974 en la junulargastejo de Saarbücken.

Okazis la kursoj por komencantoj kaj progresintoj kaj kvar literaturkritikaj prelegoj pri la Esperanto-verkisto Stellan Engholm. La prelegintoj, Hugo Greff, Reinhard Haupenthal kaj Karlheinz Schwartz, ellaboris konkludojn kaj rezultojn, kiuj ĝis nun ne trovis atenton en la Esperanta literaturhistorio.

En sia prelego pri la temo:"Lingvistikaj kaj lingvopedagogiaj konsideroj pri la facila lernebleco de Esperanto" prof. d-ro Max Mangold, Saarbrücken, klarigis el lingvoscienca vidpunkto, kial Esperanto estas pli facile lernebla ol aliaj lingvoj. Li opiniis, ke estus preferinde, ekregi Esperanton ol supraĵe ekkoni pli malfacilajn lingvojn.

La aranĝo trovis la financan kaj moralan subtenon de la ĉefministro kaj kulturministro de Sarlando, kaj de la ĉefurbestro de Saarbrücken.

Kursoj ĉe la universitato Saarbrücken

Saarbrücken (pp) Ĉe la universitato Saarbücken denove okazas Esperanto-kurso por komencantoj kaj prelegoj pri "Enkonduko en la interlingvistikon" dum la vintra semestro, vendrede de la 16-17 horo resp. 17 - 18 horo.

Novaj kotizoj de UEA

Rotterdam (pp) Por 1975 validas ekde tuj novaj pli altaj kotizoj: Membro-Jarlibro 25,- n.gld./GM; Membro-Abonanto 50,- n.gld./GM. Ĝirante vian kotizon por 1975, bonvolu atenti la novan tarifon!

Germanlingvaj eldonaĵoj

Nürnberg (pp) Ĵus aperis la germana traduko de la CED-dokumento "La problemo de la komunikado en la mondo" de d-ro G.F. Makkink, Nederlando, sub la titolo "Das Problem der Kommunikation in der Welt". Tradukis ĝin W.F.J. Walther, Kronach, kiu verkis ankaŭ aldonon. Prezo de la 20paĝa broŝuro 2,50 DM.

En 1973 aperis scienca libro kun la titolo "Die linguistische Struktur Europas Vergangenheit Gegenwart Zukunft" (La lingvistika strukturo de Eŭropo Pasinto Nuntempo Estonto) de prof. d-ro Gyula Décsy. La libro traktas la 62 eŭropajn lingvojn, inkl. Esperanton. Speciale la aŭtoro, kiu cetere estas membro de la Scienca Konsilantaro por la internacia eksperimenta instruado de Esperanto, traktas la problemon de dua lingvo por Eŭropo. Certe Esperanton la aŭtoro ne tute objektive traktas, tamen estas grave, ke en tia libro ne manku Esperanto.

Citaĵo

Nia vojaĝanta esperantisto Adalbert Masuhr, Elmshorn, skribas el Aggra, Ghanio: "Ĉi tie en Afriko la lingvo-problemo estas ege bone solvita per la franca kaj angla lingvoj. Ankaŭ estas ege bone, ke la franclingvaj landoj tie preskaŭ ĉiuj havas komunan monon, la Centralafrikan monon CAF. Do, oni ne bezonas ĉiam ŝanĝi la monon.."

Atentigo: Al tiu numero estas aldonita aliĝilo por la 53a Germana Esperanto-Kongreso 1975. Aliĝu tuj al la kongreso!

Esperanto en la radio

Komenciĝas nun la vintra programo de la Esperanto-elsendoj. Pola Radio jam eldonis sian novan programfolion, kiun oni povas ricevi ankaŭ en pli grandaj kvantoj por disdonado en E-grupoj ktp. Skribu al Pola Radio, Esperanto-Redakcio, P.O.B. 46, PL-00-950 Warszawa 1, Pollando.

Pettyn kun barbo?

Certe, ĉiu, kiu konas la popularan E-redaktoron, A. Pettyn, el Varsovio, ne imagas, ke li portu barbon. Tamen estas homoj, kiuj ne povas sin imagi esperantistojn sen barbo laŭ ekzemplo de Zamenhof. Tia homo ankaŭ estas 90jara partoprenanto en la koresponda kurso de Pola Esperanto-Asocio en iu vilaĝo proksime de Varsovio. Lin vizitis A. Pettyn por intervjui. La 9ojarulo tuj konfesis, ke li sin imagis A. Pettyn aliel. Je la demando, kiel, li diris: "Nu, kun barbo kiel Zamenhof!"

Polaj novaĵoj

La nacia banko de Pollando eldonos arĝentan moneron valore de 100 zlotoj kun la portreto de L.L. Zamenhof en la serio "Famaj poloj".

Baldaŭ okazos en Bydgoszcz "Internacia Turisma Esperanto-Foiro" arangota de la vojaĝoficejo Juventur. Renkontiĝos arangantoj de turismaj arangoj dum 1975, kiujn oni povas "vendi" resp. "aĉeti". Oni tuj surloke faros la necesajn kontraktojn.

La rolo de Pola Radio

Pri tiu temo skribas Bertil Englund, Svedio: En n-ro 33 de Pilo-Press vi tre bone atentigas pri la rolo de la Pola Radio por eksterlandaj aŭskultantoj. Mi tute defendas la starpunktonde la Pola Radio. Ni devas konstati la tre bedaŭrindan fakton, ke tro malmulte da esperantistoj konscias pri la vera rolo de sia mondlingvo. Esperanto devas tute nature obei sub samaj kondiĉoj kiel aliaj lingvoj, t.e. ĝi devas funkcii sur ĉiuj, ĉiaj kampoj de la homa vivo. Se oni uzas E nur por ekz. movadaj (idealistemaj) aferoj, ankaŭ la vortprovizo restas tre malriĉa. Homoj kiuj havas E kiel memcelon, ankoraŭ pli malhelpas larĝan rekonon de E. Estas "urĝa" tempo malfermi pli larĝan sinkritikan debaton en ĉiuj Esperanto-gazetoj pri tiu temo.

Novaj ondoj de Radio Romo

Ekde la 3 nov 74 Radio Romo elsendos sur jenaj ondolongoj:
41,15 m (7290 khc), 41,24 m (7275 khc), 49,92 m (6010 khc)
Horo kaj tago restas la samaj, dimanĉe, je la 21a horo.

Donaco de Radio Vieno

Kiu almenaŭ kvinfoje skribas al Radio Vieno, Kurtonda Servo, ricevas senpage Esperanto-diskon, nome "El Esperantujo" kun recitaĵoj de Philipp Zeska, Burgteatro Vieno.
Skribu do tuj kaj baldaŭ vi ricevos la donacon!

El la Roma leterkesto

Jerzy Uspeinsky, Varsovio, demandas: Ĉu pro la politikaj perturboj ĉe la italaj ŝtataŭtoritatoj ne falos denove la fama lerneja leĝo-projekto pri Esperanto?
Respondo: La registara krizo, en si mem, ne kuntrenas la falon de la leĝoprojektoj, sed, kompreneble, ĉio bremsiĝas, ĉar la Parlamento estas okupita preskaŭ ekskluzive en la serĉado de nova politika arango, kaj do la diskutoj pri leĝoprojektoj praktike haltas...."

Radio Berno lasttempe raportis pri la UK en Hamburgo kaj la SUK-kursoj resp. daŭrigis la prelegojn pri la svisa pentroarto.